

Helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj, 2-a parto Claude Gacond, 86-a radioprelego, 1964.07.22 & 25

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj. Vi aŭdas Claude Gacond.

Antaŭ unu monato mi tradukis al vi parton de ĉapitro de la libro *Nigra Afriko malbone startis [L'Afrique Noire est mal partie]* de la fama agronomo René Dumont.

Hodiaŭ ni revenos al tiu grava libro. Mi provos resumi ĝin dum du elsendoj.

Necesis al René Dumont multe da kuraĝo por paroli, kiel li faris en sia verko. Legantoj lin kritikis, aliaj eĉ rifuzis finlegi lian libron. Oni lin eĉ akuzis senkuraĝigi la afrikanojn aŭ apogi la plendojn de la eks-koloniistoj. Ĉio tio ĉar li provis diri la veron.

Por René Dumont la nigruloj ne plu estas infanoj, al kiuj necesas kaŝi parton de la realaĵoj. Ili estas plenkreskaj homoj, kiuj el instruo de faktoj devas kapabli mem trovi rimedojn al sia kriza situacio.

Se Afriko de sia liberiĝo travivas krizon, ĝi tamen ne estas malbenita regiono. La malfacilaĵoj, kiuj rilatas al la grundo, al malsanoj, al maltaŭga nutrado de intertropika kontinento, estas venkeblaj. Al produktado nesufiĉa revolucio povas alporti repenson de la agrokulturaj metodoj.

Hodiaŭ ni ĉefe vidos, kiel René Dumont pentras la afrikan situacion. Sendube Afriko ne ankoraŭ resaniĝis post la terura loĝantara hemoragio kaŭzita de la sklav-komercio. Oni povas kalkuli la hom-perdon por la nigra kontinento je cent kvindek milionoj da individuoj. Poste la uzo de la nigruloj por la portado, por milito kaj favore al ekonomia ekspluatado, kaj hodiaŭ superrego de komerca investado malprofite al industria investado estis kaj estas gravaj obstakloj al progreso de la afrika ekonomio.

Sendependeco ne aŭtomate kondukas al renoviĝo de la situacio. Kontraŭe ofte, post foriro de koloniistoj, privilegiita kasto formata de funkciuloj kaj regantoj pli kaj pli izolitaj de la loĝantaro okupas la ĉefajn postenojn. La novaj afrikaj landoj konis de nia civilizo ĉefe negativajn aspektojn, dekoran fasadon. Do ni ne miru, se hodiaŭ tiuj landoj vivtenas je altaj kostoj grandan aron da parlamentanoj, diplomatoj, administrantoj. Gabono ekzemple posedas po unu deputiton por ses mil loĝantoj, dum ekzemple en Francio oni nombras nur po unu deputiton por cent mil loĝantoj. Ĉiu ŝtatestro deziras sian versajlan palacon. Gabona deputito gajnas por sia funkcio pli ol brita deputito! Kaj dum ses monatoj afrika deputito ĝenerale gajnas tiom, kiom kamparano dum tridek ses jaroj da peniga laboro.

La realigoj de la kolonia epoko iluziigis. Anstataŭ fari necesajn konstruaĵojn oni starigis multekostajn neutilaĵojn. Oni timis la estonton, do investadoj nur celis rapidan tujan gajnon. Estas konate, ke koloniismo pli favoras koruptadon, ol industriigon kaj altan moralecon. Oni mekanikigis agrokulturadon kaj la uzado de traktoroj montriĝis ruiniga sistemo. Anstataŭ disvolvi nutrigajn kulturojn, oni kondukis la afrikajn landojn al monokulturo, kiu, pro la abruptaj ŝanĝoj de la mondaj prezoj, ruinigas la afrikajn kamparanojn. Kaj tiuj kamparanoj ne estis edukitaj, oni neglektis ilin, kaj anstataŭ ilin persvadi, oni devigis ilin obei.

La nuna afrika problemo estas ĉefe homa problemo. Evoluinta nigrulo ĝenerale ne pensas al la bono de sia lando, li emas riĉe vivi, kaj se li posedas diplomon, tiam li malestimas la kamparanojn kaj laborulojn kaj neglektas sian bienon. Li simple imitas la konduton de iuj blankuloj. La deziro de lernanto estas fariĝi kiel eble plej rapide funkciulo kaj tiel gajni plej multe da mono kun malmulte da peno. Pro tio oni konstatas ekzemple, ke tajpistino de la senegala registaro labore produktas la kvaronon de franca tajpistino por samnivela salajro. Instruado ĝis nun estis rezervita al la knaboj de la urboj, kaj kiam ĝi tuŝas infanojn de la kamparo, ĝi mistraktas la kamparan vivon. Tiu fakto kaŭzas kreskantan malekvilibron inter

Helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj, 2-a parto

Claude Gacond, 86-a radioprelego, 1964.07.22 & 25

urba vivo kaj kamparana vivo. En Eŭropo ni jam konas la forlason de la kamparoj. En Afriko tiu socia fenomeno ofte kreas katastrofan situacion.

Sed René Dumont opinias, ke la situacio estas ankoraŭ solvebla, tio je iuj precizaj kondiĉoj. Por li la agad-spirito de la regantoj pli valoras, ol la politikaj etiketoj. Li certe pravas. La gravo estas konsenti la ĉefrajton al plenumo de la urĝaj bezonoj de la loĝantaro. Anstataŭ ekzemple importadi aŭtomobilojn por unuopuloj klarvida registaro preferos venigi busojn kaj kamionojn, anstataŭ starigi multekostajn palacojn ĝi konstruos lernejojn kaj dispensariojn, ĝi preferos organizi la elementan kaj profesian instruadon de la kamparana loĝantaro, ol okupiĝi pri edukado de eta oligarkio kapabla nur fariĝi la privilegiita kasto de morgaŭ, ĝi provos alporti solvon al la manko de proteinoj en la nutrado de la malriĉa popolo, anstataŭ importadi luksajn nutraĵojn por siaj riĉuloj. Laŭ tiuj proponoj oni povas juĝi la intencojn de la registaroj kaj antaŭvidi katastrofon aŭ promesplenan divolviĝon por iliaj landoj.

La ekzameno de tiu libro ne nur estas utila al la afrikanoj mem, aŭ al tiuj, kiuj iras ilin helpi. Ĝi kondukas nin repensi nian sintenon kaj helpas nin kompreni la nunajn reagojn de niaj nigraj fratoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la helpo de la eŭropanoj al la afrikanoj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-